Frédéric Bérat ,

Ho Normandi'

tradukita de Adela Schafer

Ho, ĉe l' reven' de la printempo
post vintra frost' kaj malvarmec'
en mia bela franca lando
la suno brilas en helec'.
Ho, kiam ĉio reverdiĝas,
la hirundar' al Normandi'
revenas, - dum ni malĝojiĝas,
naskiĝolando kara, nur pro vi!

Mi konas Svislandeton belan
kun ĝia neĝomontĉenar',
en Italuj' ĉielon bluan,
Venizon kun la gondolar'.
Sed vidis landon mi nenie
similan al la Normandi';
feliĉa mi nur estis tie
ĉe vi, naakiĝolando, nur ĉe vi!

En ĉiun vivon venas horo,
en kiu ĉesas la revad';
bezonas tiam ĉiu koro
konsolon per la memorad'.
Se ĉesos mia kantinspiro,
mi venos tuj, ho Normandi',
al vi, pro mia korsopiro.
Naskiĝolando kara estas vi!

Traduko de la Franca poemo "Ma Normandie" de Frédéric Bérat en Esperanton de Adela Schafer *(plumnomo: Ad. Ŝefer, ∗1865-02-11).*

Arg-1029-2087 (2014-05-29 17:28:49)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Pri la tradukintino vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Louisa_Frederica_Adela_Schafer`.

Frédéric Bérat ,

My Normandy

tradukita de Tony Provencher

When far from us the Winter flies,
When the world is born to hope anew,
Under France's lovely skies,
When the sun returns in sweeter hue,
When Nature 'round us greener be,
When swallows homeward wing their way,
I love to see my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

Switzerland's dales I did behold,
And her chalets and glaciers blue;
I've seen Italian skies of gold,
And the gondoliers of Venice too.
Although these lands enchanted me,
I knew there was no hideaway
More lovely than my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

There comes a time, as life unfolds,
That brings an end to reveries.
A time when must the ransomed soul
Revisit cherished memories.
When time has chilled my muse and me,
And songs of love are sung away,
I'll see again my Normandy,
The land that gave to me the light of day.

Traduko de la Franca poemo "Ma Normandie" de Frédéric Bérat en la Anglan de Tony Provencher.

Arg-1029-2088 (2014-05-29 19:58:50)

La kanto estas aŭdebla en `http://manormandie.snoupi.com/music`. *The website of Mr. Provencher can be found at* `http://tonysmusic.snoupi.com/home2`.